



POLA ESPERANTISTO

Monata Gazeto por propagando de Esperanto



ESPERANTYSTA POLSKI



Miesięcznik poświęcony sprawie Języka Międzynarodowego

Julio 1914

WARSZAWA—VARSOVIO

Jaro IX — N-ro 7 (87)

Ĉu devas ekzisti netuŝeblaj temoj por esperantistaj propagandaj presorganoj?

Amicus Plato, sed magis amica veritas.

Por science pensanta homo la suprecitita demando ŝajnus stranga, kaj, tamen, ĝi estas pridiskutinda kaj preferinde en nia organo pro jenaj kaŭzoj:

Multaj esperantistoj, kiuj nomas sin „veraj esperantistoj“, estas tute konvinkitaj, ke por ke la lingvo Esperanto vivu, kresku kaj floru, ilia „sankta devo“ estas nek skribe, nek parole esprimi siajn eĉ plej sincerajn konvinkojn pri religiaj, politikaj aŭ naciaj demandoj, por ke ne estu ofendataj religiaj, politikaj aŭ naciaj sentoj de aliaj Esperantistoj.

Ili eĉ opinias, ke la samo estas deviga por ĉiu esperantista propaganda presorgano, ĉar alia agado ne „konformiĝus kun interna ideo de Esperantismo“.

Supozante komence, ke ni tute konsentas kun suprecitita opinio, ni pripensu, kiu el jam ekzistantaj esperantistaj propagandaj presorganoj devus plej zorge atenti, ke ĝi ĉiam agu laŭ la postuloj de „veraj esperantistoj“.

Ni bone scias, ke la naciaj propagandaj presorganoj, kiel ekz. „Germ. Esp.“, „German-Aŭstria Esp.“, „Pola Esp.“ k. c. estas legataj plejparte de samnacionoj, kaj tial, kiel malpli disvastigitaj inter diversnacionoj, certe ludas malpli grandan rolon en nia movado, ol organoj de internaciaj societoj.

El tio sekvas, ke „Esperanto“, organo de U.E.A., kies membroj estas tre multenombraj kaj disjetitaj sur la tuta terglobo, devus pli zorge, ol ĉiu alia, atenti por ke oni ne pridiskutu sur ĝiaj paĝoj religiajn, politik-

ajn aŭ naciajn problemojn, ĉar tio ja ne konformiĝas kun interna ideo de esperantismo, despli, ke sur standardo de la societo, kies ĝi estas organo, estas skribita jena devizo: „Neutraleco rilate al: religio, politiko kaj nacieco.“ (vidu § 2 de la statuto.)

Ĉar lastatempe multaj „veraj esperantistoj“ iudignas kontraŭ „Pola Esperantisto“ pro aperigo de artikolo de ŝatinda pola liberpensulo A. Niemojewski, presigita responde al artikolo de d-ro St. Schulhof en N^o 159 (25) de „Esperanto“, ni esploru, ĉu vere „Pola Esperantisto“ kuraĝis ektuŝi en suprecitita artikolo la demandojn, kiuj ĝis nun ne estis pridiskutataj en esperantista gazetaro.

Kion povus riproĉi al la redaktoro de „Pola Esperantisto“ la protestantoj kontraŭ artikolo de A. Niemojewski?

Unua riproĉo: En la artikolo estas cititaj ekzemploj de hebreaj moroj, kio, laŭ opinio de hebrea esperantisto Wiesenfeld (pseudonimo Lonkopolanski), dolore povas tuŝi la Hebreojn. („Krio de doloro“ en „Le Monde Esp.“).

Sed jen kion mi, interalie, trovis en „Esperanto“:

En N^o 118 (1912). „Estas io sovaĝeca en la baŝkira karaktero... Ili estas kredemaj, mallaboremaj, babilemaj, edzinamemaj, gloramaj kaj vantecaj; en 146 (10). „Turkino, kiel vera produkto de sia medio estas malklera, sklavema, kaj flirtema. Altaj ideoj, sociaj idealoj

estas nekonataj de ŝi, kontraŭe, la medio instigas ŝin esti *voluptema*. La *prostitucio* oficiale estas malpermesata por islamanoj, sed en realeco ĝi estas multe pli disvastigita ĉe ili, ol oni povas pensi.

en № 148 (12) „Kelkaj karakterizoj de Bulgaroj... Mankas al ili hereda bonmaniereco, kiun posedas serboj...”

Mi estas tute certa, ke ĉiuj vere „veraj esperantistoj” konsentos, ke tiuj, pri kiuj oni skribas, ke „mankas al ili hereda bonmaniereco” (Bulgaroj), ke ili estas „malkleraj, sklavemaj, voluptemaj”, ke „ĉe ili la prostitucio estas multe pli disvastigita, ol oni povas pensi” (Turkinoj) povas opinii sin „tuŝitaj kaj dolore tuŝitaj” („Krio de doloro”) kaj, tamen, U.E.A. opiniis la suprecititajn artikolojn konvenaj por sia organo, kaj post aperigo de ili, neniu el „veraj esperantistoj”, aŭ samnaciaj esperantistoj presigis kontraŭ s-ro H. Hodler artikolojn kun titoloj: „Honto al Esperanto”, aŭ „Krio pro doloro”.

Mi supozas, ke kleraj Bulgaroj kaj Turkinoj ne agis tiamaniere tial, ke ili mem vidas, ke ne ĉio ĉe ili estas en la ordo kaj pro tio, ili opinias pli utila instrui siajn malklerajn gefratojn, por eble pli rapide malaperigi el inter malklera popolamaso ekzistantajn mankojn, ol, kiel Hebreoj, nur sendi kriplenajn sed tute ne konvinkajn protestojn kaj protestegojn, kies sola celo estas, supozeble, pli longedaŭra retenado de alilandanoj kaj alireligianoj en konvinko, ke ĉe ili, kaj nur ĉe ili, ĉio estas kaj ĉiam estis en la ordo.

Ke tia supozo ne estas senbaza, plej konvinka pruvo estas konstato, ke ĉiuj kulturaj nacioj lastatempe kreis tre riĉan folkloran literaturon kaj nur preskaŭ mankas folkloraj esploroj de Hebreoj pri Hebreoj.

Sed la konstatita malsama reagado de vere „veraj esperantistoj” povas dependi ankaŭ de tio, ke laŭ ili vortoj: „sklavema”, „voluptema”, „mallaborema” kaj frazoj: „mankas al ili hereda bonmaniereco”, „la prostitucio ĉe ili estas pli disvastigita, ol oni povas pensi” povas ofendi nur certajn naciojn, sed ne ĉiujn. Sed tiuokaze bonvolu klarigi al ni kiujn, kaj kial nur ilin?

Dua riproĉo: Redaktoro de „Pola Esp.” „permesis al si tiel senhonestigi la hebrean Talmudon. Tiel malhonorigi tion, kion dekelkaj milionoj da homoj konsideras *sankta* estas barbareco, vandaleco” (vidu suprecititan

art. „Krio pro doloro” en № 6(675) de „Monde Esp.”).

Komparante tion, kion presigis la redaktoro de „Pola Esp.” kun jeno, kion ni trovis en artikolo „La Hindoj” de s-ro H. Bregbie en № 134 (1912) de „Esperanto”:

„Oni devas rememorigi sin fojon post fojo, ke tiuj interesplenaj popoloj ĉiuj absolute kaj tute malsimilas nin... Tia ĝentila kaj eĉ serĉema Hindu kredas, ke la mondo estas plata, lia *dio estas miksaĵo de Bacchus'o, Don Juan kaj Dick Turpin...* li ne pli volonte promenus kun sia edzino, ol li mortigus bovinon... li kredas, ke la virinoj ne havas animon; kaj rilate al via propra, honorata supera persono li kredas en la koro, ke vi estas malpura laŭ viaj kutimoj, freneza laŭ viaj ideoj kaj abomena al la dioj. Ili loĝas mondon spiritan, malsimilan al nia... Ni aĉetas kaj vendas kun ili, sed la pensoj de iliaj koroj, aspiroj de iliaj animoj ne estas niaj pensoj kaj niaj aspiroj kaj laŭ ĉio, kio faras el la homo saĝan kreitaĵon, malsaman ol ĉiuj brutoj, ili estas tiel apartaj kaj malsamaj de ni, kiel la mondo de la luno... Ili havas malsaman moralecon... Ili estas tiel konstruitaj, ke *ili povas imagi dion*, kaj eĉ honorigi lin, kiu rompas ĉiun regulon de ilia propra morala kodo, kaj *kiu ŝajnus terura monstro al londona rabisto... ktp. ktp.*”

Mi konkludas, ke de vidpunkto de „veraj esperantistoj”, kies heroldo estas, interalie, „Le Monde Esper.” la frazoj: „lia dio estas miksaĵo de Bacchus, Don Juan kaj Dick Turpin”, „dio, kiu ŝajnus monstro por londona rabisto” devus esti opiniataj eĉ pli „naŭze abomenaj”, ol frazo uzita de s-ro Czerwiński „Talmudo, tiu terura libro de superstiĉoj kaj de malamo al ĉio eksterhebra”.

Tamen mi nenie povis trovi ian proteston en la gazetoj, kiuj tiel forte ekreagis kontraŭ artikolo de A. Niemojevski, kvankam la lasta ofendis, laŭ opinio de Lonkopolanski mem, nur dekelkaj milionoj da hebreoj kaj s-ro H. Bregbie, ankaŭ laŭ kalkulo de l' aŭtoro mem, — „tricent milionojn Hindojn”

Pripensante la demandon, oni povus alveni al konkludo, kvazaŭ „veraj esperantistoj” opinias, ke „konforme al interna ideo de Esperantismo” nur certaj religioj estas kritikindaj, sed aliaj netuŝeblaj.

Se tia supozo estas ĝisfunde erara, kiamaniere kompreni la aplikon de malsamaj mezuroj al samspecaj kulpoj?

Respondo al tiu ĉi demando povas esti nur jena: de vidpunkto de homoj, por kiuj l'amiko estas Platono, sed pli amika estas la vero, la malpermeso pritrakti certajn problemojn, en konscia falsado de faktoj, ĉar tio povas ofendi iun, estas vera sensencaĵo, pura absurdo, ĉar decidi, kio povas ofendi religiajn, politikajn aŭ naciajn sentojn de aliaj samideanoj estas trege malfacile, se ne tute neeble; plej bona pruvo de tio estas la fakto, ke eĉ U.E.A., sur kies standardo estas enskribita la devizo: „Neutraleco rilate al religio, politiko kaj nacieco“ tiurilate ne estas sen kulpo.

Por eviti tion, estus necesa starigi en ĉiuj landoj, kie oni propagandas Esperanton, specialajn oficejojn por politika kaj religia cenzorado de esperantistaj organoj, kio post ne longe povus alkonduki al fondo de „sankta“ esperantista inkvizicio. Sed, ĉu tio estas dezirinda?

Pensante, ke la vero, kiajn ajn problemojn ĝi tuŝu, povas ruinigi nian movadon, ni samtempe igas supozebla, kvazaŭ la fundamento de nia granda konstruaĵo estas bazita sur la malvero.

La lasta supozo, se ĝi iam ekaperu en animoj de homoj, povas, mi kredas, pli malutili nin, ol ĉiuj jam aperintaj artikoloj kune, kvazaŭ ofendantaj religiajn, politikajn, aŭ naciajn sentojn de niaj samideanoj.

Tria riproĉo de protestantoj: „li grandege ofendis l'aŭtoron de Esperanto“

Por defendi s-ron Czerwiński kontraŭ suprecitita riproĉo, mi citos, kvankam mi opinias la riproĉon tuta senbaza, vortojn de ŝatinda redaktoro de „Lingvo Internacia“, s-ro Th. Cart, ĉerpitajn el lia artikolo „Por Esperanto“ (L. I. 1912 majo).

„Se anstataŭ ekzameni esperantajn problemojn *en ili mem*, ni ĉiam demandus nin, ĉu ia aŭ alia solvo plaĉos al iu, aŭ alia eĉ plej grava eminentulo, pli saĝe estus tuj forlasi ĉian propagandon, ĉian esperon, ĉar baldaŭ nia afero perdiĝos en la marĉon de ia ĝenerala, malpreciza, absolute senfrukta, sentimentala, bonanimeco, kiu ĉion aprobas, ĉion laŭdas, ĉion akceptas kaj sisteme fermas la okulojn antaŭ plej gravaj eraroj de eminentaj amikoj. Virojn bezonas nia movado, kiuj, ne serĉante personan sukceson, momentan aprobon, aŭ aplaŭdon, agu vire, lojale kaj eĉ kun danĝero malplaĉi al plej kara amiko, aŭ al respektata persono kaj diru tion, kion postulas la vero!“

Konvinkita, ke ne devas ekzisti por esperantistoj kaj por iliaj propagandaj organoj iaj netuŝeblaj temoj, mi opinias, ke tio, kion ŝatinda s-ro Th. Cart skribis pri esperantistaj problemoj, estas sambone aplikebla al ĉiuj, kiuj ajn ili estu, problemoj.

Laŭ mia opinio, se A. Niemojewski ne eraras, kion povas klarigi nur tute libera interdiskuto pri hebrea demando sur paĝoj de ĉiuj niaj gazetoj, kiuj havas neniajn speciale profesiajn celojn, nur unu fakto estas por normala, ne difektita de religia aŭ alia partieceo, intelekto nekomprenebla, nome, kiamaniere iu hebrea esperantisto povas sincere kredi, ke ĉiu nehebrea („goj“) estas „zava“, aŭ malpura pro ne plenumo de hebreaj postuloj pri rita pureco, prediki inter siaj samreligianoj la malamon al ĉiuj nehebreaoj kaj samtempe kanti pri intergenta harmonio kaj amo.

Nepre, aŭ kantante nian himnon, aŭ predikante la malamon al ĉio eksterhebrea, li surmetas la maskon. Personon, kiu predikas la malamon al ĉiu alinaciano ni nomas ŝovinisto.

Se ni demandus iun, kiu el ŝovinistoj estas pli danĝera por nia movado, ĉu tiu, kiu ĉiam kaj ĉie laŭte deklaras militon al ĉio alinacia, ĉu alia, kiu inter siaj samnacianoj, aŭ samreligianoj militas kontraŭ ĉio eksterhebrea kaj samtempe, trovinte sin inter esperantistoj, diversnacianoj kaj diversreligianoj, kantas kun ili himnojn pri paco, amo kaj neutraleco, mi estas certa, ke li senhezite respondos, ke pli danĝera estas la lasta.

El tio sekvas, ke, se A. Niemojewski, ni ripetos, citas korekte la Talmudon, ĉiuj vere „veraj esperantistoj“, kiuj aprobas la artikolon de Th. Rousseau, pri ŝovinistoj, devus, por esti konsekvencaj, jenon, kion li skribas pri ŝovinistoj, eĉ pli zorge apliki ankaŭ al Talmud-konfesantoj kaj Talmud-defendantoj.

„Esperanto“ №-157(17). La unua konsekvenco estas, ke U.E.A. devas enhavi inter siaj membroj neniam ŝovinistojn. Aliĝi al U.E.A. — signifas akcepton de ĝia statuto. Simpla honesteco devas malpermesi, ke iu homo, konsideranta perforton, kiel racian kaj taŭgan rimedon inter la homoj, eniru en Asocion, kies celo estas plifaciligado de la homaj rilatoj kaj kreo inter ili de fortika ligilo de solidareco.

Plie ni opinias, ke, se tamen eniras en niajn vicojn tiaj homoj, estas nia devo ilin forigi*...

Resume oni povas konkludi, ke anstataŭ starigi novan plej dezirinde estus por ni, esperantistoj, sen dividoj en du klasoj: *simplaj* kaj *veraj* akcepti kiel nian propran la devizon de ĉie honesta homo:

„L'amiko Platono, sed pli amika estas la ve-

ro,* ĉar de tiam permeseble estus pritrakti ĉiujn demandojn en ili mem kaj malpermesata nur konscia falsado de faktoj.

L. Chybczyński.

(elp. Ĥibĉinski)

Warszawa (Varsovio)
en Julio 1914.

membro de T.F.K.A

KORNEL MAKUSZYŃSKI

Du memmortigantoj.

Mia amiko, pentristo, tiel ekfuriozis, kvazaŭ li estis trinkinta akvon, ĉar estas ja konata fakto, ke ĉiu pentristo gardas sin de akvo — same, kiel de fajro. Li kuradis tra la „ĉambro“ (nomita tiel de mi malice kaj sen ia ajn motivo) kiel tigro, sed tia el plej teruraj, kiu farus nenion nur manĝus viandon. Tiurilate, cetere, ĉiu pentristo estas treege simila al tigro.

La pentristo, pri kiu mi parolas, vere similis sangavidan tigron kaj estis nomata — Dio lin pardonu — Simeono Skarabo. Li estis fortika besto malgraŭ tiel kaduka nomo; en la ŝultroj larĝa, kiel buĉisto, aŭ Herkuleso, forta, kiel valizportisto ĉe la stacidomo kaj senhonta, kiel librovendisto. La barbon li havis, kiel misiisto, kvankam, pro siaj konvinkoj, li estis pli ĝuste hommanĝanto, sed ne apostolo.

Nun li ŝiradis sian barbon, kiel huragano, sed ne nia huragano-ftizulo, sed kiel vera amerika huragano. Nun li estis tiel furioza, ke de li oni povis atendi ĉion, eĉ pagon de luomono. Tamen ŝajnas al mi, ke mi troigas. Vera pentristo ne farus tion eĉ en ebrieco.

Do kuradis Simeono Skarabo tien kaj reen, tute ne interese, kaj nur de tempo al tempo por certa diverseco, li piedbatis laŭvoje seĝon, aŭ la tablon, kiu pro timo tremegis.

— Aaa... Aaa... — veis Skarabo.

Kaj en atako de subita furiozo, li komencis jetadi pentrtolojn kaj, elektinte plej malbonan skizon (sprita ruzulo!), li ĝin disŝiris kun la pasio, kiun oni malofte povas vidi eĉ sur la scenejoj de ĉefurbo, kiam oni prezentas tragedion, aŭ dum la kunveno de famaj poetoj. Dum tio li eligadis ian timigan krimon kaj hendon, kvazaŭ difektita gramofono, aŭ kantistino de operejo. Tia pentristo certe povas ĉion imiti.

Fine, kvazaŭ pozicio sur du piedoj, por fari tiun operacion, estus al li maloportuna, li sin jetis sur dorson, kaptis la kapon per am-

baŭ manoj kaj, hurlante, li frapis plankon per siaj fortaj piedoj.

Resonis al li en la sama momento kun timtremo vitroj de la fenestroj kaj alttone eksonoris du boteletoj kaj unu soleca glaso, kiun finmordis malespero, ĉar ĝi havis ĉirkaŭmorditan randon.

Sur suba etaĝo ekhurlis hundo, timigita, kaj la korvoj, sidintaj sur la tegmento, kun krio leviĝis supren.

La pentristo tutan tempon frapadis la plankon, kion, cetere, notis ĉiuj seismografoj. En la sama momento terure ekknaris la pordo, kvazaŭ animo en turmentoj.

La pentristo, aŭdante ke iu eniras, ekfuriozis pli forte, tute ne atendante kiun li elvokis per sia kriado. Tio daŭris iom pli longe ĉar la gasto ne proksimiĝis. Fine tedis malespero al la pentristo, do li ĉesis por ia momento skuadon de la domo, levis la kapon kaj rigardis la veninton. Ekvidinte konatan figuron, li plej trankvile daŭrigis sian okupon.

— Tiel devis aspekti sankta Vito, — diris la gasto.

Simeono Skarabo levis la kapon, poste leviĝis kaj komencis senpolvigi la veston. Li rigardis la gaston; la gasto venis sen ĉapelo, ĉar li loĝis je unu etaĝo malsupre. La gasto estis terure longa kaj malgrasa persono; vizaĝon estimata gasto havis serenajn kaj simpatian, kaj rigardis per blujaj okuloj sen sciavo, ĉar li neniam miris.

Li estis ankaŭ pentristo kaj pentris sole maldecajn aktojn. Li ĉirkaŭrigardis la ĉambron, forviŝis per basko de la jako malpurajon de la seĝo kaj trankvile sidiĝis.

Pale rigardinte furiozan Skarabon, li demandis:

— Ĉu vin dentoj doloras?

— Stultulo!...

— Mi tre badaŭras, ke ne la dentoj, ĉar mi havas tute freŝan terebinton kaj ĝi al vi bone helpus... Sed vi timigis mian hundon!...

Skarabo ekkoleris.

— Por kio vi grimpis ĉi tien?

— Ĉar mi pensis, ke vi min vokas per la frapado. Sed vi timigis mian hundon!..

— Diru al via hundo, ke ĝi estas bestaĉo.

— Bone, mi diros... Sed pro kio vi furioziĝis?

Simeono Skarabo tuj fariĝis treege malgaja, lia vizaĝo estis ĉagrenita, malespera.

— Ĉu vi konis mian onklon? — li demandis.

— Mi konas diversan kanajlaron...

— Li estas tiu, kiu min vizitis antaŭ unu semajno, tia tre korpulenta kaj dikokola...

— Oh, jes! mi lin observis. Jes, jes, kriminala tipo.

— Li havis propran domon...

— Ha, Dio lin pardonu!

— Li trompakiris mian plej bonan bildon...

— Jen stultegulo!..

— Malsaĝulo vi estas... Vi nur aŭskultu: tiu kanajlo-onklo...

— Sufiĉas diri: kanajlo, kaj oni tuj divenos, ke la afero okazas en via familio...

— Vi atentu, ĉar ĝis nun nenion mi eljetis kun tia forto, kun kia mi vin eljetos...

— Trankviliĝu, ĉar vi denove timigos mian hundon... Nu, kion do faris via onklo?

— Li mortis.

— Neeble! No, no, no!

— Pro kio vi hurlas?

— Ĉar mi estis certa, ke li finos sian vivon sur pendigilo, li ja havis propran domon.

— Vi estas prava. Sed ĉu vi scias, kion li testamentis al mi?

— Heredan moligon de la cerbo?

Skarabo atentante nenion, proksimiĝis al la forno kaj en ĝia regiono, el amaso da kravatoj, kolumoj, cigar-tubetoj kaj ĉifonoj, eltiris terure ĉifitan leterpaperon.

— Jen vi ĝin havas, — li kriis — legu!

La amiko suspekteme rigardis la leteron.

— Aŭskultu, — li diris, — eble via onklo mortis pro ftizo, en tia okazo estas pli bone, ke vi mem legu, mi ne volas ĝin preni en la manon.

Skarabo lin rigardis kun malamego, poste, penante esti tute trankvila, komencis legi:

— ... „Estante sur la lito de doloro kaj morto, kiun bona Dio sendos al mi eble eĉ morgaŭ, eble post unu horo, aŭ eble eĉ post unu horkvarono, mi skribas al vi lastfoje dum la surtera vivo, kiu estas vanta kaj malfeliĉa, esperante, ke vi atentos vokon el post la tombo, kiu

admonas, ke vi rekonsciiĝu kaj lasu la ĝisnunan vivmanieron. Antaŭ ĉio forlasu al cent diabloj tiun kanajlon, kiu loĝas sub vi, tiun sentaŭgulon, kiu pentras nur nudajn virinojn, kaj vin loĝas al malbonkonduco...“

— Ha, li skribas pri mi — triumfe interrompis legadon la amiko.

— ... „poste mi konsilas al vi labori kaj eljeti eĉ el la penso tiun aktorinon, kiu kostas vin almenaŭ dek rublojn monate, ĉar por tiom da mono viaj enspezoj ne sufiĉos, kaj mi donos nenion, ĉar al vin similantaj sentaŭguloj oni devas doni nenion, por ke ili ne elspezu en restoracioj kaj ne tagmanĝu trifoje dum la tago, aŭ eble eĉ pli multe. Tial do tutan mian posedajon mi testamatis por la preĝejo kaj petis, ke oni preĝu por via savo, kvankam tio helpas nenion, ĉar el tia malnobla individuo, tute egale, ne estos bona homo, eble nur pentristo.“ Aaaa!

Maldika kamarado gaje ekpalpebrumis kaj sufokekspiris, li pro ĝojo komencis singulti.

— Ĝi estis tre bela domo, — li diris fine.

— Pendiĝu, — respondis malespere ĉagrenita Skarabo.

— Kaj vi pensis, ke vi ĝin heredos?

— Mi ne pensis, mi estis certa!.. Mi ruinigis, mi havas ŝuldojn!..

— Al mi vi ŝuldas dek kopekojn por la tabako, vi memoru pri tio...

— Mi estas ruinigita, mi kalkulis sole je lia morto...

— Vi nun kalkulu je la mia... Vi heredos hundon.

— Stultulo!.. Kion mi nun faros? De ĉi tie oni min eljetos, se ne hodiaŭ, do morgaŭ; mi havas nenion por manĝi, mi ne havas per kio dungi modelinon...

— Vi pentru vian onklon en ĉerko, tio ja koston nenion.

Skarabo denove ekfuriozis subite; li denove kuris tra la ĉambro ŝradis sian hararon.

— Mi min pafmortigos, — li ekkriis — mi pafmortigos min...

— Aha, — diris maldika amiko, — kaj se vi renkontos post la morto tiun ananason, vi dorsen al li turniĝu.

— Mi rompos lian rip-aron, por ke li ne povu veni lastan Di-juĝon.

Subite li haltis antaŭ la amiko kaj metis la manojn sur lian ŝultron.

— Aŭskultu — li diris — je nomo de Dio, mi ne ŝercas, mi vere ne havas eliron. Mi aj

al Fenjo promesis pagi kalkulon de tajlorino, al domgardisto mi donis parolon de honoro, ke mi redonos du rublojn...

— Ho, tio estas malbone...

— Kio estas malbone?

— Vi tro facilanime donas parolon de honoro.

— Mi estis devigita, parolon de honoro, mi estis devigita...

— Jes, sed vi demoralizas barbarulon... Oh, malbone!

— Nu, kaj kion mi nun faru? Mi pafos en la frunton kaj finite. Kial do, al diablo, mia kapo sekigu pro pensado!...

— Nature — diris la amiko — pro tia abundeco da akvo, kiun vi havas en la kapo, ĝi estus sufiĉe malfacila tasko...

Skarabo estis malgaja. Li klinis kapon super la brusto kaj pro tio aspektis tre mizere. Poste per funebrista paŝo li venis al la tablo, elprenis el la tirkesto ian teruran revolveron kaj malgaje ĝin ĉirkaŭrigardis.

La amiko per indiferenta voĉo demandis:

— Ĉu ĝi estas oleumita?

Skarabo silentis.

— Kaj kien vi volas pafi, ĉu en la koron, ĉu en la kapon?

— En la koron kaj en la kapon. Ĉu tio vin koncernas?

— Ĉar, se vi volas pafi en la kapon, vi devus longe ĝin serĉi, kaj pro tio mi konsilas, ke vi pafu en la koron.

— Stultegulo!

Sed la amiko estis treege bonkora, kvankam malgrasa.

— Mi vin kompatas, Simeono, vi tion komprenu; sen vi mi sopiros, ĉar ĉiam ja estas pli gaje al homo, se li almenaŭ hundon konatan havas, des pli la amikon. Kaj kie vi ĉion ĉi plenumos? Certe ne ĉi tie, ĉar la tuta kanajlaro tuj alvenus.

— Certe aliloke.

— Cetere vi denove timigus mian hundon, ĉar ĝi estas tre nerva. Kaj kion fari kun viaj objektoj?

— Vi ĉion prenu kaj pendigu.

— Vi kredu, Simĉjo, ke mi vin akompanus, okaze se vi longe turmentigus, sed je mia amo mi ne povas... Mi ne havas tempon...

— Ne necesas...

— Nature... Sed la entombigon mi ĉeestos, tute certe ĉeestos. Do ni ne plu revidigos! Neniam! Mi ne ploros, ĉar tio ja min ne multe koncernas... Se vi volas vin pafmortigi, vi tion faru. Neniu rajtas tion al vi malpermesi. No,

Dio donu al vi, karulo, feliĉon kaj sensuferan morton.

Li forte premis manon de bonkora Skarabo, dolorplene ĉirkaŭrigardis la ĉambron, malĝoje balancis per la kapo kaj foriris.

Kaj nur el post la pordo li kriis:

— Hej, Skarabo!

— Kion ankoraŭ?

— En la okazo, se vi malfrue revenus hodiaŭ nokte, vi ne tro bruu, ĉar mi ne povas dormi.

— Rompu vian nukon!...

* * *

Simeono Skarabo sin vestis per io, kio povus eĉ esti simila al mantelo, teruran revolveron li kaŝis en la poŝon, ekbruligis cigaredon kaj iris for. Al li ŝajnis, ke ĉiuj preterpasantoj lin mistere rigardas kaj kun respekto liberigas al li la vojon.

La vento hurlis alttone, aŭ subite ĝi ridegis freneze, pro sukcesa estingo de lanterno. Maldense pluvis, kvazaŭ pro dormemo de la pluvo la gutetoj faladis senforte, dormeme, enue.

Skarabo iris tra koto, spite konkludinte ke la homo, iranta por certa morto, povas malatenti purecon de la botoj. Li iris en la direkton de soleca parko, kie li decidis finisian vivon plenan je doloro, malagrablaĵoj, koloriloj, penikoj, terebinto kaj larmoj. Jes, tiel li sin mortigos sur la sama benko, sur kiu li juris al flavruĝa Fenjo, kantistino, eternan amon, vespermanĝon kaj ungpolurilaron por la nomtago. Ŝi pensu, stulta simio, ke li tion faris pro ŝi. Bone ja estas lasi sur la tero almenaŭ unu solan dankeman koron.

— Ĉar kortgardisto, kanajlo, min malbenegos, — li pensis.

La vento dentgrincis super lia kapo, kiam li eniris en la parkon kaj kraĉis en lian vizaĝon per pluvo de la plej proksima betulo. Skarabo malgajigis, kunpremis revolveron en la mano kaj iris pluen. Lin malagrabla agordis pendiga humoro de la parko; kaj tuta Skarabo iel nekutime strange sin sentis, tamen li iris pluen. Neniu individuo estas pli obstina ol pentristo.

Kiam li proksimiĝis al la benko, tiu sanktigita benko, sur kiu estis elgravurite multe da koroj, multe da amsignoj, — li rimarkis, ke sur ĝi iu jam sidas. En unua momento li ekmiris, poste li ekstremis pro irito.

— Al diablo, — li pensis — pro kio li sid-

as tiel malfrue sur la benko. Pluvegas, kaj tiu idiotegulo sidas...

Li flanke preterpasis kaj arogante rigardis la sidanton, kiu kliniĝinte, silente kaj treege modeste lokiĝis sur rando de la benko. La nekonato estis tre eleganta kaj videble ĝenema. Skarabo, preterpasante, provoke kaj sentime ektusis. La nekonato respondis nenion. Li nur peteme rigardis la pentriston. Skarabo ankoraŭ unufoje lin preterpasis, fine, tute in ne atentante, li sidiĝis kun tia forto, ke la benko krakfleksiĝis. La nekonato lin rigardis kun malespero.

Skarabo spiris malfacile, certe pro irito. Lia animo ŝvelis pro kolero, simile al velo, pleniĝinta je vento; de tempo al tempo li jetadis tiel terurajn rigardojn al nekonto, ke pro ili certe devus esti bluaj postesignoj sur pala vizaĝo de la nekonato, tiel estis fortaj la rigardoj.

Fine la situacio tedis al la pentristo. Li sin turnis al la nekonato kaj senhonte demandis:

— Ĉu vi ne frostas, sinjoro?

La posedanto de pala vizaĝo rimarkeble ektimis kaj respondis nenion.

— Ĉar se vi frostas, estas konsilinde, ke vi iru hejmen.

— Mi tute ne frostas — respondis fine silentema sinjoro, — mi ja malhelpas al neniu. La pentristo ekmiris.

— Kontraŭe, vi malhelpas.

— Oh, oh, oh...

— Nature...

— Mi treege petas pardonon, — respondis la nekonato, — sed mi venis la unua.

— Kion do tio pravas?

— Sekve vi, sinjoro, al mi malhelpas.

Skarabo sincere ekmiris pro tia senhonteco. Kaj subite li diris per ia terura voĉo:

— Ĉu vi scias, sinjoro, ke havas rilaton kun homo, por kiu vivo signifas nenion.

Pala sinjoro malgaje ekridetis.

— Tre eble — li diris, sed tio min tute ne koncernas.

— Mi estas Skarabo, — diris laŭte la pentristo.

— Kio, kio vi estas... skarabo?

La figuro treege maltrankviliĝis.

— Mi estas nomata Skarabo.

— Ah, vi tiel estas nomata. Tio vere estas tre interesa.

Iom levinte la ĉapelon li diris:

— Kaj mi, bedaŭrinde, neniel estas nomata.

— Frenezulo, — pensis Skarabo maltrankvile. Kaj laŭte li diris:

— Vi neniel estas nomata?

— Mi tute ne estas nomata...

— Sed vi estis iel nomata?

— Tre eble... estas tre eble.

La figuro parolis tre malgaje, malgaje. La pentristo eksentis kompaton, lian bonan koron plenigis indulgo. Li rigardis la najbaron kaj ekvidis palan vizaĝon, bonan vizaĝon, treege lacan kaj estingiĝintajn okulojn.

— Vi ŝajnas havi ian ĉagrenon en la koro — li demandis.

— Jes, iometan...

— Mi petas pardonon, ke mi pri tio parolas, sed vi sciu, sinjoro, ke mi estas bonkora homo, nur iomete freneza kaj, krom tio, mi havas ĉagrenon. Povas ŝajni, ke tio havas nenian koncernon unu kun la alia, sed tiam homo aspektas, kvazaŭ ĉevalaĉo...

— Ĉu vi estas poeto.

— Dio min gardu! — pentristo.

— Mi estas tre dankema al vi... Tio tute ne malhelpas, kontraŭe...

— Kio devas malhelpi. Mi vidas, ke vin mordas ia ĉagreno, kaj mi vin pro tio kompatas. Mi ankaŭ havas ĉagrenon, kara sinjoro. Mia onklo mortis kaj ĉion testamentis al la preĝejo, sed bona Dio punos lin pro tio. Nu, diru nun vi mem, ĉu pro tio homo ne poras freneziĝi?

— Oh, certe. Kaj vi pro tio estas tiel malgaja?

La pentristo ekkoleris.

— Malgaja! Sinjoro, hodiaŭ mi al tuta mondo kun plezuro rompus la ripojn. Oh, sed vi timu nenion...

— Mi ja ne timas; vi ŝajnas esti bona homo.

Io kunpremis koron de la pentristo.

— Vere bona mi ne estas, sed ankaŭ mi ne estas tro malbona. Kaj ekzemple vin mi tre kompatas... Vi ne faru, sinjoro, stultajn mienojn, ĉar vere mi vin kompatas. Kio vin mordas, sinjoro?

— La vivo.

— Jen, bestaĉo. Kaj kien, ĉu la koron?

— Iom la koron, iom la cerbon, kara sinjoro. Eh, ne valoras pri tio paroli.

— Oh, kontraŭe, ĝi meritas preparolon; pri tia kanajlo, kia estas la vivo, oni ĉiam devas paroli. Parolon de honoro. Sed gaje oni ne povas pri ĝi paroli...

Pala sinjoro ekridetis.

— Oskar Wilde diras, ke vivo estas la afero tro serioza, por ke oni povu pri ĝi serioze paroli.

— Kiu diras? Oh, min tute ne impresas tio, kion iu ajn pri ĝi diras. Kaj ĝi min tute ne interesas, mi scias nur tion, ke mi devas eligi mian koleron...

— Jen feliĉulo!

— Mi?

— Nature, ĉar vi iritos kaj, se la okazo helpas, vi rompos al iu ajn ripojn, kaj poste ĉio reboniĝos. Sed ne ĉiuj povas fari sammaniere...

— Nature, se iu estas idiotegulo, tiu sin mortpafas...

La nekonato sulkigis la frunton.

— Kion vi diris?

— Ke se iu estas stultulo, kaj havas konfliktojn kun la vivo, tiu sin mortpafas. Li fostumigas orelojn por venĝkolerigi panjon... Ah!

Parolante tion, iom ruĝiĝis la bonkora pentristo, kaj li diris kompromise:

— Esceptinte, se iu havas veran ĉagrenon.

Pala sinjoro rigardis kun fido la pentriston kaj demandis, malrapide parolante:

— Kaj se perfidus vin via edzino, sinjoro Skarabo, kion vi tiam farus? Ĉu ĝi estas ĉagreno, aŭ ne?

— Oh, tiam mi min mortpafus, sed pro tute alia kaŭzo, ne pro tio, ke ŝi min perfidis, sed pro tio, ke mi edziĝis.

— Ah, tiel!

— Memkompreneble, ke tiel.

En tiu momento li rigardis la silenteman kunulon kaj pacige demandis:

— Ĉu vin perfidis la edzino?

— Jes! — ekĝemis tiu.

— Ah, sentaŭgulino! — konkludis la pentristo.

Aŭtuna pluvego enuige gutetis; knaris trunkoj de la arboj, kiujn skuis en histeria atako malvarma vento; ĉirkaŭe estis nek viva, nek morta spirito.

Pala sinjoro proksimiĝis al Skarabo, kies koro degelis simile al vakso; li rigardis kompatindan memmortigonton bonkore kaj sincere.

Skarabo sidis, metinte manojn en la poŝojn de la palto; en la dekstra mano li havis sian teruran revolveron, kiu diable enuis pro senlabora vivo.

Ambaŭ memmortigantoj silentis iom pli longe; kompatinda, pala, perfidita edzo plorspiris tra la nazo, iom pro malvarmo, iom pro tio, ke larmoj ekfluis el la okuloj, kaj tio su-

bite iritigis la pentriston, individuon senteman je homa malfeliĉo kaj homaj larmoj.

Sian kortuŝiĝon li esprimis per ia stranga kraĉospirado, simila al tiu, kiun faras la hipopotamo, kiam ĝi elgrimpas el la akvo, kaj fine per la voĉo, kiu ŝajnis, ke ĝia posedanto estas tute indiferenta por la aferoj de tera kaj postmorta mondo, demandis:

— Ĉu vi nepre vin pafmortigos?

— Nepre.

— Kaj sur ĉi tiu benko?

— Ĉar mi jam estas ĉi tie, sekve... jes. Mi ne havas tiom da forto, por ŝanĝi la lokon.

— Do, en tiu okazo, mi, eble, malhelpas al vi. Mi iros for.

Pala sinjoro rigardis la pentriston peteme kaj kun timo.

— Ne, vi sidu...

— Li timas — pensis la pentristo kaj laŭte li diris:

— Vi estas treege ekscitita... Tio estas tre malbone, ĉar la memmortiganto devas esti trankvila...

— Mi dum tri noktoj maldormis.

La pentristo ekkoleris.

— Kial? Dum tri noktoj vi suferis kaj nun hodiaŭ vi volas vin pafmortigi? Vi estas sentaŭgalo, kara sinjoro. Kaj pro kiu, pro la virino? Mi nenion dirus, se vi havus ian veran malfeliĉon, se vi rompus vian brakon, se la dentoj vin dolorus, aŭ io simila... Ĉu vi havas belan edzinon?

— Jes, belan...

— Eĉ en tia okazo, ĉu ĝi estas malfeliĉo? Ŝi vin perfidis, diablo ŝin prenu. Kaj tio, ke vi pri ĝi eksciis, estas via pura profito, ĉar en mala okazo, ŝi vin perfidadus kaj vi al ŝi kredus. Kion vi deziras ankoraŭ? Cetere, eble estas eĉ pli bone, ke vin perfidis la edzino!

— Kion?!

— Simpla afero. Vi aspektas tro honeste, vin, permesu al mi tiel esprimi, mi domaĝas por edzo.

La memmortigonto ekridis tra larmoj.

— Kion vi rakontas...

— La veron mem. Por kio homo honesta havu la edzinon? Ĉu vi vidis iam pentriston kun edzino? Ĉu ne vere, neniam! Kaj se iu ajn pro eraro edziĝos, do, post unu semajno li jam iras poŝtofacejon, aŭ al juĝejo, aŭ alian lokon, kie oni petas pri tio, kaj postulas ek-edziĝon. Tiel oni ĉiam agas... Kaj vi volas vin pafmortigi pro la edzino, kaj ĉu vi scias,

ke tio iritas? Kial, ŝi mem vin perfidas, ĝuante pro tio plezuron, kaj vi, havante ĉagrenon, volas vin pafmortigi. Eljeti ŝin, virinaĉon, kaj finita la ceremonio.

— Tiel ne estas eble, sinjoro Skarabo.

— Kial?

— Ja multe signifas, ke la preĝejo...

— Preĝejo! Ne memorigu al mi pri tiu institucio, ĉar min frapos apopleksio! ja mia onklo ĉion testamentis al la preĝejo.

— Kaj la skandalo...

— La skandalo nenion signifas. Pli granda estos la skandalo, se morgaŭ oni vin trovos ĉi tie. Cetere, kia skandalo? Ĉu vi estas la grandprinco, ke vin koncernas la skandalo. Diabloj prenu la skandalon! Min iam sur la ĉefstrato arestis la policano, ĉar li min opiniis pro eraro ŝtelisto kaj mi tute tion ne atentis. La tuta nia vivo, kara sinjoro, estas skandalo, kaj grandega skandalo.

La nekonato malĝoje klinis la kapon, per silento aprobante dirojn de la pentristo. Kaj tiu lasta, kuraĝigita, ekparolis, kiel elokventa oratoro:

— Mi ĵuras al vi, ke se vi hodiaŭ vin pafmortigos, mi ne plu premos vian manon! — Skarabo tro entuziasmiĝis. — Ĉar mi sentas abomenon al la persono, kiu pro tiel bagatela kaŭzo, kiel edzina perfido, pafas en sian frunton. Kion do vi pensas, ke via edzino post la perfido treege ĉagrenos pro tio? Se vi tion pensas, tiam en via cerbujo ne ĉio estas en la ordo. Ŝi mendos al si nigran veston kaj kolorigos sian vizaĝon, por ke ĝi estu pala. Parolon de honoro! Ho, ho! sinjoro mi bone konas virinojn.

La „palvizaĝulo“ nerimarkeble ekridis kaj poste, hezitante diris:

— Jes, sinjoro, Skarabo, eble vi estas prava, ĉio povas reboniĝi, sed se mi ne forlasos tiun ĉi mondon...

— Kiun diabloj prenu!

— Bone, ili ĝin prenu, sekve, se mi ĝin ne forlasos, mi faris kompromison kun sola afero: kun la honoro.

La pentristo lin rigardis, kiel frenezulon.

— Kun kio, kun kio?

— Kun la honoro.

Skarabo ankoraŭ iom proksimiĝis kaj komencis klarigadi al la memmortigonto, kiel klarigas malpacienca instruisto al malkapabla lernanto. Parolante li ŝvingadis per la manoj kiel freneza ventmuelejo, kriis kiel dum familia kunveno kaj spiradis, kiel lokomotivo.

— Vi estas stulta. Vi min ne interrompu, ĉar vi vere estas stulta... Vi kompromisos kun la honoro. Ĉu vi ion ŝtelis, aŭ mortigis iun? Al diablo! Ĉu vi estas kulpa, ke vin perfidis la edzino? Kio? Kian leĝaron vi obeas? Pendigu ŝi mem, ĉar ŝi malhoneste agis rilate al vi, aŭ sin venenu tiu stultulo, kin vin priŝtelis... Vi tiel forte ŝin amas, ke vi ne povas travivi sian malhonoron? Sed ĝi estas malvero, ĉar en tia okazo, vi ŝin la unuan mortigus, kaj poste vin mem. Do vi ne estu tiel grandanima, ĉar neniu tion aprobos. Jen romantikulo, freneziĝis la homo!

— Sed, sinjoro Skarabo...

— Vi min ne interrompu,—kriis Skarabo— mi vin tre petas pri tio, ĉar mi tiom da impertinentaĵoj al vi diros, kiajn vi ankoraŭ ne aŭdis dum la tuta via vivo!...

La nekonato kliniĝis pro tiuj insultegoj, kaj timigita rigardis teruran pentriston; li nur malkuraĝe murmuris:

— Vi tro bilde esprimas viajn pensojn.

— Pro tio, ke mi estas pentristo, sed ne la individuo, kiu timas propran edzinon. Vi estas malkuraĝulo, ĉu vi tion scias?

— Dio! — ekspiriris la memmortigonto — se mi havus almenaŭ parton da via energio kaj deziro de vivo!

— Deziro de vivo?

— Jes, sinjoro, ĉar en vi bolas la vivo, krias ĝi en vi, estimata sinjoro Skarabo! Oh, vi neniam vin mortigos!

Tiuj ĉi vortoj dologiĝis koron de Skarabo.

— Vi tiel opinias? — li demannis preskaŭ malkuraĝe.

— Tute certe.

Tiam Skarabo respondis tre fiere:

— Do vi min konsideru, kiel ekzemplon. Vi kraĉu en la vizaĝon de la vivo, ĉion moku. Vi revenu al via edzino kaj diru, ke ŝi agu laŭ sia plaĉo, ĉar nenio bona estos el ŝi. Oni ne devas forpreni liberon de virino, ĉar ŝi forkuros, do ŝi forkuru. Pro kio vi ŝin kaj vin memsuferigos? Do, vi ambaŭ post tio bone fartos. Vi, certe, ambaŭ ne konvenas unu por la alia, same, kiel du malkonformaj tabuloj, el kiuj oni nenion faros eĉ la ĉerkon.

La memmortigonto ĉion ĉi aŭskultis kun ia ĝoja scivolemo; li ne interrompis paroladon de la pentristo, sed atentis ĉiun lian vorton, kiel tiu, kiu aŭskultas fremdan mensogon, por per ĝi pravigi sian propran. Li pli kaj pli ofte ridetis kaj pli scivole rigardis kaj pro tio ekĝojis animo de la pentristo, kiu vidis, ke lia krio ne estis vana.

— Eble vi pravas, sinjoro Skarabo, eble vi pravas.

— Mi ĉiam estis prava, des pli nun, ĉar temas pri la virino. Oni ĉiam pravas, parolante pri la virino. Malnova ĝi estas vero. Kaj al vi mi ne permesos vin mortigi, eĉ se mi devus sidi ĝis la mateno mem. Memmortigo estas tre ordinara stultajo. Antaŭ ĉio vi devas jurpromesi, ke vi forigos tiun virinaĉon.

— Mi ne iros al ŝi.

— No, iros mi mem, kaj finite.

— Sinjoro Skarabo...

— Eble vi pensas ke mi timos? Oho! Mi tian diros al ŝi predikon, ke ĝi ĝis ostoj ŝin penetros...

— Mi ne volus fari al vi embarason, Dio gardu! Sed vi estas ekstraordinare honesta homo.

— Ĉu ne vere?

— Mi ĵuras.

— En tia okazo redonu revolveron.

La memmortigonto rapide deŝoviĝis kaj kunpremis en la mano la revolveron.

— Ĉu vi redonos la revolveron?

— Ne mi tion ne faros.

— Eee! — diris mokeme la pentristo.

Li kaptis ambaŭ manojn de la nekonato kaj reprenis de li revolveron, kvazaŭ de infano. Li estis tro ekscitita, por povi rimarki, ke malgaja memmortigonto ne tre forte kontraŭstaris. Skarabo, kontentigita, kaŝis la revolveron en sian senfundan poŝon.

— Nun vi povas vin pafmortigi! — li diris kun triumfo.

— Vi agas maljuste kontraŭ mi, sinjoro Skarabo.

— Sensencaĵoj!

— Vi faris al mi eĉ tro grandan maljustaĵon, ĉar mi ne povas vivi.

— Nu tiel ŝajnis tio al vi. Eble pro tio, ke ĉi tie estas tro malvarme. Do vi pli bone vin ŝirmu per via mantelo kaj ni iru for el ĉi tiu loko.

— Ni iru. Kien?

— Kien vi volas. Ĉu vi jam vespermanĝis?

— Hodiaŭ mi eĉ ne pensis pri vespermanĝo — respondis malgaje la demandito.

— En tia okazo ni iru vespermanĝi. Mi vin invitas. Sed ĉu vi havas kun vi monon?

— Mi ĝin havas.

— Vi estas originala memmortiganto: havante monon, vi iras vin pafmortigi.

Kaj frapita per bona humoro la pentristo batis en la ventron simpatian memmortigonton.

Tiu lasta havis iom malĝojan mienon, sed ne ĝis tia grado, ke ĝi minacu per la morto. Ili prenis unu la alian sub la brakon kaj sin direktis tra la koto en la urbon.

— Vi min terurigas, sinjoro Skarabo...

— Ne grave. Rekompence vi pagos la vespermanĝon, sed... sed... Vi sciu, sinjoro, ke mi havas amikon. Li ankaŭ estas pentristo, sed li estas treege malgrasa kaj tro manĝema, li ankaŭ utiligu tiun ĉi festenon, ĉar, certe, li hodiaŭ manĝis nenion.

— Kun granda plezuro.

— Mi vin avertas, sinjoro, ke li kunprenos ankaŭ sian hundon, tre ĉarman bestaĉon, kvankam iom favan; ĝi ankaŭ estas tre manĝema.

Pala sinjoro jam gaje ridis.

— Ni kunprenu la hundon ankaŭ.

— Nu, en tia okazo jam ĉio estas bone. Nu, vi mem konfesu sincere, ĉu tio ĉi ne estas pli bona, ol truigi propran frunton?

— Eble ĝi estas pli bone. Diabloj ĝin scias! Sed diru al mi sincere, sinjoro Skarabo, kiaj diabloj vin portis en tiel malfrua horo en la parkon. Kion vi tie faris? Ah, parolon de honoro, tio estas interesa.

Simeono Skarabo faris seriozan mienon, ĵetis teruran rigardon al la kamarado, eltiris timigan, rustiĝintan maŝinon, kaj, ĝin montrante al mirigita kunulo, diris:

— Por kio mi venis en la parkon? Ĉar mi volis min pafmortigi, sinjoro.

Al kamarado de Simeono Skarabo ekŝajnis, ke tiu lasta freneziĝis.

— Aaa, — li nur ekkriis.

— Sole vi malhelpis en tio al mi — diris klare kaj laŭte Simeono Skarabo — kaj mi ne pardonos tion al vi ĝis la morto mem... Ni iru do vespermanĝi, al cent diabloj!...

el pola lingno trad.

M. Horbaczewski

Festo de frateco de popoloj.

Antaŭ kelka tempo en Londono okazis tuta monda kongreso de sav-armeo. La kongresanoj aranĝis grandiozan marŝadon tra la stratoj de Londono por kunveni en la ĝardeno Hyde-Park.

Tiu marŝo estis vere impona festo de popola interfratiĝo. Partoprenis en ĝi ĉirkaŭ 10,000 personoj reprezentantaj 54 diverskolorajn naciojn el ĉiuj partoj de terglobo. La marŝo aspektis tre pitoreske, ĉar ĉiu grupo portis siajn naciajn vestojn, tiamaniere oni povis vidi kaj aŭdi preskaŭ ĉiujn popolojn de la tero. Inter apartaj grupoj iris orkestroj kaj ludis naciajn melodiojn.

Fronte marŝis anglaj sav-armeanoj en bluaj uniformoj de anglaj maristoj kaj nigraj de infanterio. Ili kantis atikvan anglan himnon el la tempo de kruc-militoj.

Post la anglaj iris amerikanoj kaj kanadanoj. Parto da amerikanoj rajdis en vestoj de cov-boy'oj. Post ili marŝis grupoj el Aŭstralio kaj Sud-Afriko. Inter ili estis Zulusoj, Kafroj kaj Basutoj en originalaj afrikaj vestoj t.e. preskaŭ sen vestoj.

Tre ĉarme aspektis nederlandaj knabinetoj en naciaj kostumoj.

Germanoj vestis malhelbluajn jakojn kaj ĉapelojn kun blankaj plumoj; Svisoj havis montanajn vestojn kaj portis turistajn bastonojn.

Ludante per arĝentaj trumpetoj iris fortaj kaj lertaj svedoj en bluaj uniformoj kun flavaj rubandoj. Post ili veturis en ĉaro danaj rikoltistinoj. Per malgrandaj paŝoj iris Japanoj, portante grandajn lanternojn kaj kriante „banzaj“.

La publiko amasiĝinta en densaj vicoj ĉe

la stratoj salutis ĉiujn grupojn en angla lingvo kaj kiam aperis aro da virinoj en ruĝaj frigiaj ĉapetoj, aŭdiĝis laŭta ekkrio: „vivu Francujo“ je kiu oni respondis: „vivu Anglujo“.

En granda veturilo sub palmoj sidis hindoj kaj ludis per flutoj; post ili en longaj vestoj, similaj al noktaj ĉemizoj kaj kun miniaturaj nigraj ĉapeloj rajdis flavaj koreanoj.

La tuta loĝantaro de Londono — de plej riĉaj ĝis [plej mizeraj fervore bonvenigis la sav-armeon.

Kiam la marŝo eniris Hyde-Park'on, ŝajnis, ke oni estas kvazaŭ apud Babelturo. Dekdu tribunojn suriris dekdu oratoroj, kiuj ekparolis per plej malsamaj lingvoj. Amasego da publiko ĉirkaŭis la bulvarojn. [Oni kalkulas, ke en Hyde-Park estis ĉirkaŭ milionkvarono da publiko.

Tre karakteriza estis la parolado de adjutanto Bambov, zuluso kiu rakontis, kiamaniere li fariĝis ano de armeo.

— Mi venas el lando — fervore parolis la zuluso — kie la homoj havas nigran haŭton kaj multaj ankaŭ nigran koron.

Miloj da homoj vivas tie en malklero. Tiuj homoj ne konas Dion. Ili interbatalas per lancoj. Mia patro estas sorĉisto. Mi esis soldato de Dinizilu. En unu batalo oni min vundis. Tiam generalo Booth sendis al mia domo oficiron, kiu devis min kuraci.

Li diris al mi, ke mi havas animon, — ke malbone estas mortigi, — ke mi devas interami. Kaj tiam mi konvertiĝis. Mi estas feiĉa ĉar mi estas soldato de sav-armeo,

Tiel influas la homojn tiuj, kiuj havas kiel devizon: feliĉigi kaj glori Dion pro feliĉo.

El „Dziennik Polski“

JULIO SŁOWACKI.

Fragmento.

Ĉar jen plej glora forto de poeto,
Ke li firmigan ekadiaŭu horon,
Eterne ploros ĉi tiu paĝeto
Kaj havos ploron.

Dum vi foriros al land' malproksima,
Finiĝas mia surtera vojaĝo...
Mi iras sola kun malĝoj' senlima
Kiel ĉi paĝo.

Paris 1846

trad. Czesław Kozłowski.

BABEL i EIFFEL.

Potomkowie Noego, povias Pismo Ŝviete, zapragnęli zbudować wieżę, kŕorej wierzcholek aź do nieba by sięgał, lecz oto Bŕg pokrzyżował ich plany, bo pomieszał języki, tak że jedni drugich nie rozumieli. Niedokończona wieża została nazwana mianem „Bebel“ to znaczy zmieszanie. Zmuszeni do rozłączenia się potomkowie Noego rozeszli się by zaludnić rŕżne części ŝwiata; potomkowie Sema osiedlili się w Azji Ŝrodkowej i wschodniej, Chama w Egipcie i w Afryce, wreszcie potomkowie Jafeta udali się do Azji Mniejszej i potworzyli wiele wysepek w Europie, z kŕórych powstały potem odrębane narody.

Pewnego pięknego poranku potomkowie

Jafeta przypomnieli sobie zamiar swych przodkŕw. I oni zapragnęli zbudować wieżę, kŕóra byłaby najwyższym pomnikiem na ziemi, lecz będać rozsądniejszymi nie chcieli jej wznosić do nieba, tylko na 300 mtr. w gŕrę. Bŕg pozwolił im zamiar ten uskutecznić.

I oto za kilka dni ujrzemy w Paryżu zebranych pod wieżę Eiffla potomkŕw Sema, Chama i Jafeta, mŕwiących międy sobą jednym językiem: Esperanto. I historia zanotuje ten nowy cud, podkreślając to, że jeźeli wieża Babel była wieżę pomieszania językŕw, to wieża Eiffla stała się wieżę zjednoczenia gwar ludzkich.

Emil Houbart.

Z mies. „Movado“

Berta von Suttner.

21-an de junio, en Wien, mortis granda amiko de Esperanto — Berta baronino von Suttner.

Naskiĝinta en Praha 1843, kiel grafidino von Kińsky, per rilatoj de familio, eduko kaj edzigo ŝi apartenis al plej alta austria mondumo. Ĝin do ŝi bone konis kaj analizis en „Highlife“ kaj aliaj verkoj. Tiu kapablo de rafinita analizo, nobleco, aristokratienco, ligita kun sistema aŭtodidakto, agorde funkciis kaj permesis al B. v-S. fariĝi nek plata kortega satiristino, nek fipatosa literaturistino el burĝaro, permesis ellabori spiritan liberecon, dank' al kiu ekzemple, ŝi, 71-jara korteganino de Lia Apostola Moŝto, rifuzis partoprenon de pastraro en sia enteriga ceremonio, kio permesis fine, ke nomo de Suttner estu ligita kun humana voko: „For batalilojn!“. Tia estis devizo en fondita kaj prezidata de ŝi „Unio de Pacamikoj“, titolo de monata organo (Bern, de 1892 j.) kaj de la Romano. Tiu verko eldonita en 1889 estis tradukita en multajn lingvojn kaj lastjare en Esperanton, kion plenumis prof. Gaumont laŭ deziro de l' aŭtorino. Ĝi famiĝis personon de Suttner kaj donis al ŝi en 1903 j. premion de Nobel por paco.

Depost homo estas homo kaj ĝis li estas tia, principo „ne mortigu“ eĉ ne bezonas formulon. Sed en tumulto de vivo malpurigas spirito, hazarde okazas senigo je vivo, ŝajnantan nenatura, en alia loko ree, kaj fine venas terura afero: homa lingvo eltrovas homon por malbono.

Poste scienco ĝin dividas je kategorioj, juro klasifikas punojn, „per karbo oni blankigas tolon“. Jen altspiritulo formulas malaprob-an principon, kiu por kelkaj momentoj sobrigas homaron, sed baldaŭ iĝas ero de oficiala katehismo kaj firmigas pozicion de malbono.

Ripetado de formulo ne helpas — oni ĝin parkere scias.

Tial multaj faktoj, amuze kaj draste rakontitaj, estis prezentataj: homoj interesiĝas tra legas kaj en li ĝermas penso „ne mortigu“ Li ekkmemoras, ke patentitaj saĝuloj diradis la samon kaj li komencas sin estimi kaj prediki „sian propran ideon“. Naskigi en homon penson kaj naskigi ĝin en tiu direkto estas glora ago.

La romano donas pli, ĉar liveras perfektajn argumentojn por apogo de tiu ideo, kaj bazo de ĉiuj estas la veramo.

Vivo de Berta v-S. ne koincidas kun vivo de grafino marta v. Althaus — „mi“ de l' romano — en multaj detaloj. Tiu lasta ŝanĝas ŝovinistajn konvinkojn je kontraŭmilitoj pro perdo de sia unua edzo en batalo kaj la subjektiva motivo ĉiam estas fonto de ŝia aparta konduto en militista familio. „Kien ajn rigardo falis, ĝi renkontis kurbiĝintajn, bandaĝitajn, palajn vizuĝojn. Mi ne kuraĝis tion rigardi, ĉar la erecon de energio kiun mi posedis, mi volis konservi por vojaĝo kaj flegado de mia edzo“. Berta v-S. agis alie. Tamen la romano rajte portas subtitolon „Vera historio“. Vera ĝi estas en tio, ke evidentigas unu: sufiĉas

rakonti pri milito tutan veron por abomenigi ĝin, rakonti, ke landoj ruiniĝas foje pro nesukcesinta edziĝo de ministro kaj neniam pro sin pravigeblaj kaŭzoj kaj ke la „eksteraj devigaj cirkonstancoj“ per kiuj emas sin pardonigi militantoj, estas homa blindeco kaj stulteco.

Nia epoko subtenas tragedian aktualecon de „F.B.“ kaj B. v-Suttner mortis kun vortoj „Mi iros al Durazzo“.

La Romano indas tralegon ankaŭ pro sia arta valoro. Oni kontraŭdiris tion, ne apartig-

ante „F.B.“ de cetera novelaro de Suttner, kiam ŝi komencis literaturan agadon pro manko de vivrimedoj. Sed „F.B.“ estas verko, per kiu la aŭtoro „trovis sin mem“; la medio de scenoj kaj historia fono, estas pentritaj kompetente, tipoj estas reliefaj, enplektitaj intrigoj sufiĉus por pli ol unu memstara verko kaj la tendencecon (tiun ĉefan argumenton kontraŭ arteco) nuligas la nobla tendenco.

W. T.

Scienco kaj vivo.

Urbo 7.000 jara.

Amerika inĝeniero kaj arĥeologiisto Lafau asertas, ke en stato Orizona (Nord-Ameriko) apud urbo Feniks troviĝas ruinoj de antaŭ 7,000 jaroj.

Liaj esploroj supozigas, ke en tiu urbo vivis altkultura popolo. La urbo estas konstruita el sabloŝtono kaj la formo de konstruaĵoj atestas pri granda disvolvo de arĥi-

tektura arto. Inĝ. L. trovis tie kotonon kaj pro tio konkludas, ke en Orizona estis iam tute alia klimato. Sur unu muro li trovis religian pentraĵon, kiu indikas, ke la nekonataj loĝantoj de Orizona adoris sunon.

La tuta urbo estas kovrita per tera tavolo alta je tri metroj. Nuntempe oni laboras pri elfosigo de la ruinoj.

Deka universala kongreso de Esperanto.

La nombro de la kongresanoj ĉe la 25-a de Junio estas: 3.248

De la 2-a ĝis la 10-a de Aŭgusto 1914.

Adreso: 3, place Jessieu, Paris France. Bankoj: Société Général (Agence AR), 15, Boulevard Montmartee, Paris. Ĉekbanko Esperantista, Merton Abbey, London S. W.

DUM LA KONGRESO.

S-ro Agache laboradas por ornami la Gaumont-Palace inde de la Kongresanoj; senbezzone estas admoni ilin, ke ili estos gastoj de S-ro Gaumont, kaj devas nenion difekti. Ili troviĝos komferte, kiel en la propra hejmo; do ili konduku ĝentile kaj afable, kiel en la propra hejmo. Kongresanoj, kiuj volos publikigi ion, ne gluu afiŝetojn, nek skribu per la kredo; preferinde ili uzu la kongresgazeton aŭ la servojn de speciala literpentristo.

En la Kongresejo, ili povos ricevi siajn leterojn, kondiĉe, ke la adreso estu nepre jena:

S-ro LABOREMULO

Kongresano № 1189 bis

Deka Kongreso de Esperanto

Gaumont-Palace

Paris

Dum la Kongreso, povas okazi, ke kongre-

sanoj bezonos legitimacion, speciale ĉe la poŝtoficejoj. Por tiu celo estas rekomendinda la nunjara membrokarto de U.E.A. Ĝi devas surhavi la fotografajon de la posedanto kaj esti oficiale atestata konforme al la leĝoj de lia lando.

Laŭ oficiala informo de la franca Poŝtdirekcio, je la dato de la 23-a Decembro 1913-a, la membrokarto de U.E.A. povas esti akceptata, kiel legitimacio ĉe la poŝtoficejoj. (La nomoj kaj adreso de la posedanto estu skribitaj nepre per latinaj literoj).

La preparado de „La Morto de Sokrato“ de S-ro Prof. Nobelpremiito Richet, lerte tradukita de S-ro Jean Couteaux, bone progresas.

Seriozaj aferoj. Konkursoj: la Oratora, pri kiu sciigojn oni ricevos en la Kongresejo;—la Bilarda, kies regularo jen estas:

1-e Ĉiu lando devos prezenti al tiu Turniro nur unu ĉampionon, nepre antaŭ Merkre-
do 5-an de Aŭgusto tagmeze;

2-e Ĉiu partoprenanto pagos kotizajon, fikсотan laŭ la nombro de la konkursantoj, kaj utiligotan por akiri premiojn al la gaj-
intoj;

3-e La ludoj de l' fina internacia Turniro konsistos el 100 poentoj, kiuj devos esti ple-
numitaj per kiel eble plej malmulte da re-
ludoj;

4-e Ĉe ĉiu ludo povos kontraŭludi nur du
konkursantoj;

5-a La ordon de la kontraŭludantoj deci-
dos nur lotado.

La programo.

La programo estas iom ŝanĝita:

1-e La Malferma Kunsido okazos dimanĉon,
je la 9-a vespere. Efektive kelkaj samideanoj
opinias, ke ili devas aliri Versailles nepre di-
manĉe, ĉar tiun tagon okazas festo en Ver-
sailles. Tiu festo okazos. Okazos ankaŭ, ke
la Esperantistoj irintaj Versailles vidos abso-
lute nenion pro la popolamaso, malbonege
manĝos (se ili manĝos!) pro la urĝiĝo en la
malmultaj hoteloj, kaj eble ne povos reveni
Parizon vespere, ĉar ordinare okazas, ke la
vagonaroj ne estas sufiĉe ampleksaj por enri-
cevi ĉiujn. Dolorate je la kapo, je la sto-
mako, je la kruroj, ili estos kontentegaj re-
veturi Versailles kun la Kongreso jaŭdon,
kiam ĉio estos speciale preparita por ili. Ili
bone vidos, bone manĝos kaj bone amuziĝos.
Oni fidu la Parizanojn, kiuj eble estas iomete
spertaj pri tio.

2) La K.K.K. deziras, ke la Rejtigitaj De-
legitoj havu privatan kunsidon tuj de la ko-
menco de la kongreso. Tiu kunsido okazos
lundon matene, je la 10-a, kaj la kunsido
de la Lingva Komitato estos prokrastita ĝis
la 17-a, post la malferma kunsido de U.E.A.

3-e Ĉar kelkaj Kongresanoj deziras tor-
veturi dimanĉon posttagmeze, la ferma kun-
sido, kiu estis antaŭvidita por tiu tago, oka-
zos sabaton vespere. Dimanĉon posttagmeze
okazos ekskurso al Sant-Denis.

FAKAJ KUNVENOJ.

Juristoj.

Merkr. 5 de Aŭg. Je la 10-a, Ĝeneralala
jarkunveno de Internacia Societo de Esperan-
tistaj Juristoj en ĉambrego de l' Jura Fakul-

tato. Je la 12-a, Komuna festeneto en apuda
restoracio. Neesperantistoj-samprofesiuloj est-
us utilige invititaj. Je la 15-a, Vizito de l' Pa-
laco-Juĝejo sub gvidado de nia eminenta sa-
mideano S-ro Daniel, konsilanto ĉe la Kasa-
cia Kortumo.

Katolikoj.

Sin turnu al organizanto: S-ro Cl. Colas,
7, rue des Marronniers, Montmagny (Seine-
et-Oise).

Protestantoj.

Antaŭ kelkaj semajnoj S-ro Edmond Privat
faris paroladon pri nia lingvo ĉe la Protes-
tanta Teologia Fakultato kaj komencis kurson
por grupo de tieaj studentoj.

Anstataŭ havi, kiel estus eble, nuresper-
antan diservon en iu pli malgrava preĝejo, la
fremdaj Kongresanoj estos oficiale akceptataj
en la granda historia protestanta ĉefpreĝejo
l' Oratoire du Louvre ĉe la kutima horo de
l' diservo: 10 h. 15 m.

La eklezia konsilantaro decidis honori la
fremdajn samreligianojn dediĉante por tio la
diservon de dimanĉo 2-a de Aŭgusto. Estas
nun publike anoncita por tiu dato:

„Speciala dulingva diservo okaze de la
X-a Universala Kongreso de Esperanto”

La diservon prezidos la fama franca pre-
dikisto Pastro Wilfred Monod, prezidanto de
l' Tutfranca Unuiĝo de l' Protestantaj Ekle-
zioj.

Li france predikos tre mallonge pri „Es-
peranto por antaŭenigi la Regnon de Dio” kaj
post li parolos esperante du aŭ tri aliaj pa-
stroj diverslandaj.

Krom la franca parto de la diservo estos
ankaŭ esperantaj kantoj kaj preĝoj.

Dulingva ordo de la diservo estos disdo-
nita al ĉiuj ĉeestantoj.

Ne forgesu kunpreni:

Diversajn brosilojn kaj purigilojn, ĉap elojn
subvestojn, kolojn, kravatojn, noktvestojn, vi-
zitkartojn kun via bonmiena fotografajo (ed-
ziga afero) aŭ celrideta portreto (edziniga
afero), vortarojn kaj Ĉefeĉajojn; pinglojn, fa-
denon kaj kudrilon, la provizoran karton, la
invit-leteron por rabato sur la francaj fervo-
joj, monujon kaj paperujon, kun la enhavo;
skribilon; fotografilon; la karton kaj Jarlibron
de U.E.A.; *Deordo Dandin* kaj *Sokrato* (tre
beletristikaj kunvojaĝantoj); bonhumoron.

Kronika.

S-ro Santiago Gemis, prezidanto de la Oficiala Esperanta Klubo, partoprenis feston de la Societe Circel - Valencia, paroladante pri nia movado (en la urbo Rosario de Sta Fe).

En Bahía Blanca la propagando estas tre intensa kaj konstanta: grandaj afiŝoj estas metitaj en la montrejojn [de gravaj komercejoj, anoncanta du ĉiudimanĉajn senpagajn kursojn de Esperanto, dudek kvin gelarnantoj ilin ĉeestas. Inter ili estas nomata speciala komisiono por fondi esperantistan klubon en Bahía Blanca.

AŬSTRIO.

Wien.

La oficiala sezono jam finiĝis, sed kursoj daŭras kaj eĉ novaj komenĉiĝis. La movado pli kaj pli kreskas. En belega printempa vetero okazas komunaj dimanĉaj ekskursoj en la nekompereble ĉarman ĉirkaŭaĵojn de l'urbo.

Pilsen.

Kurso gvidita de S-ro Nowohradski en germana komerca akademio finiĝis kun tia sukceso, ke la direktoro S-ro Kröger intencas enkonduki Esperanton en la lernoplanon de 1914 — 15

Olmütz.

Fondiĝos grupo.

Villach (Karintio).

Merkrede, la 2 de Majo finiĝis la kurso en Klagenfurt, ĉefurbo de Karintio, kiun gvidis S-ro Homer kaj D-ro Wedam. Estis 42 gelernantoj. Fine faris 19 gekursanoj la ekzamenon pri kapableco, parte kun bonega, parte kun bona sukceso. Ĉe la kurso partoprenis tri blinduloj, kiuj ankaŭ faris la ekzamenon. Du el la gekursanoj aliĝis al la Pariza Kongreso.

S-ro Homer, en Klagenfurt, fondis esperanton, kiu aliĝis al la Esperanto - Unuiĝo por Karintio. Tiu ĉi rondo kalkulas ĝis nun 16 anojn. S-ro Homer ankaŭ gvidas superan kurson kun 16 anoj.

D-ro Max Wedam, prezidanton, foriros al Triest. Ni petas, de nun, ke ĉiujn sendaĵojn por la „Esperantoverein für Karntein“ oni adresu: Al la Esperanto-Verein für Karntein, Villach, Bismarckstrasse, 7.

FRANCUJO.

Federacio de la Normandaj Esperantistaj Grupoj. La kongreso de normandaj samideanoj

okazis la 24 de Majo en Sottevilles - Rouen, kun plena sukceso.

La „najlo“ estis la inaŭguracio de la „strato Zamenhof“. Grandega parto de la loĝantaro kaj la tuta eminentularo de la loĝantaro kaj la tuta eminentularo de la esperanta festo por montri al la Esperantistoj sian simpatian al nia afero.

Belegajn paroladojn faris la urbestro, la prezidanto de la Esperantista Grupo de Sotteville, nia malnova samideano D-ro Cayeux, kaj nia tiom malnova samideano S-ro Guerant, prezidanto de la grupo de Rouen, kiu legis dankan leteron de nia Majstro D-ro Zamenhof al la urbestro de Sotteville, kio, kompreneble naskis entuziasmajn aplaŭdadojn,

Tiuj lokaj kongresoj eblaj dank' al la ekzisto de Federacioj, faras granegan bonon al nia afero.

Federacio de la Burgonjaj Esperantistaj Grupoj. La 30, 31 de Majo kaj 1 de Junio okazis en Bourg la Villa Esperantista Kongreso de Burgonjo. Ĝi havis lokon en Instituto Carriat, kaj plene sukcesis. Citindaj: oficiala akcepto de la kongresistoj ĉe la urbdomo, farita de la urbestro mem, S-ro Loiseau; grandega banketo kun 120 kunmanĝantoj sub prezido de S-ro Justin Godart, deputato, prezidanto de la Franca Esperantista Deputitaro; elokvantaj paroladoj, koncertoj, promenadoj, ekskursoj, vizitoj al vidindaĵoj, baloj, k.t.p.

Ĉio montris nian kreskantan potencon, kaj bone efikis sur la spirito de la profanoj de la urbo.

FINNLANDO.

Tampere (Tammerfors).

La plej grava kaŭzaĵo de la kongreso estas, ke la idista grupo en Tampere, kiu jam de kelkaj jaroj ekzistis nur „sur papero“ preskaŭ aŭ tute neniel agante, baldaŭ tute malaperos. Ĝiaj kvar restantaj estratanoj (aliaj anoj ne estas!) promesis transdoni la tutan havaĵon de la grupo al nia Esp. societo.

Tuj post la kongreso ĉi tie komenciĝis Esp. kurso gvidata de S-ro Toivo Lehtonen. Ĝin partoprenis 24 personoj, el kiuj preskaŭ duono fininte la kurson aliĝis al la grupo.

Kvankam samtempe kun la kongreso en la urbo okazis alia tutlanda kunveno, la lekcionoj aranĝitaj de Finna Scienca Akademio, kiu iom malhelpis nian propagandon, la atento de la

publiko estis altirata al Esperanto. En la elmontra fenestro de librejo Lyytikäinen estis dum unu semajno post la kongreso Eŭropa karto, sur kiu estis markitaj ĉiuj Esp. grupoj kaj delegitoj. Dank' al la karto la librejo baldaŭ elvendis siajn Esp. lernolibrojn same kiel aliaj lokaj librovendejoj.

Abo.

Lasta printempa kunveno de Esp. Grajneto okazis la 13 de majo. La Grupo decidis garanti al E.A.F. 100: Fmk. Samfoje kelkaj samideanoj garantiis ankaŭ kune la saman sumon. Preparojn de la kvina ni jam komencis. La fraŭlinoj promesis kudri flagojn por ĝi. Aranĝita malgranda loterio profitis por la kurso Fmk 40

Helsingforso.

En kunveno de la Blindulsocieto en Helsingforso la 10: an de majo sinjoro V. Setälä invitite parolis pri la nuna signifo de Esperanto por ĉiu kaj speciale por blinduloj.

La Helsingforsa filio de Finna Lernejana

Asocio en sia kunveno la 18: an de majo diskutis pri la tempo „Angla lingvo aŭ Esperanto“. La temo estis priraportata de du personoj, lernejanino Aarna Castrén (por angla lingvo) kaj studento V. Setälä (invitite, por E.). La kunveno ne decidis pri ia rezolucio, sed videble la okazo interesigis pri E. multajn el la kelcenta ĉeestantaro.

JAPANUJO.

Tokjo.

Ĉiuj konsidoj de Tokiaj esperantistoj tre vigliĝis. Ili kunsidas jaŭdon ĉiusemajne (krom la tria jaŭdo de la monato) ĉe Bucurigakko-Sciencia Lernejo. La tutan vesperon, preskaŭ ĝis la noktomezo ili gaje babiladas en Esperanto, diskutas pri lingvaj demandoj, gvidas komunculojn, k.t.p.

La trian jaŭdon de ĉiu monato oni kunsidas ĉe Kafejo „Paulista“, la kunsido estas tute — esperantistema.

Jaŭdon, jaŭdon... ili eĉ senpacience atendas la tagon.

El Esperanta Mondo.

S-ro Georg Davidov el Saratov entreprenas eldoni senprokraste ruslingvan serion de broŝuroj pri aplikoj de Esperanto:

- 1) Esperanto kaj la Blinduloj.
- 2) „ „ „ Vegetarismo
- 3) „ „ „ Kristanoj Unuiĝoj
- 4) „ „ „ Pacifismo
- 5) „ „ „ Virinoj

Mi jam sendis al li la problindulan ka pri-vegetaran materialon kaj penados kiel eble plej baldaŭ kolekti ankaŭ pri tri ceteraj temoj.

Sed por ke ĝi estu valoraj propagandiloj de nia movado, mi petas gesamideanojn ĉiulandajn sendi al mi sciigojn pri la diritaj demandoj. Uzonte la materialon por presado, mi citos la nomon de la persono, kiu sendis tion aŭ alion. Tia solidareca internacia verkado havos pli da signifo.

La broŝuron pri la blindula demando s-ro

Davidov intencas eldoni 30-paĝe kaj dezirante prezenti al la rusa legantaro „*Nomaron de ĉiuspecaj verkoj Braille, presitaj por blinduloj, aperintaj de la jaro 1887 ĝis la 1914.*“ Li jam kolektis la titolojn de pli ol 100 diversaj verkoj.

Sed li deziras nepre kompletigi la nomaron kaj petas sciigi pri ĉiuj verkoj ekzistantaj por blinduloj-esperantistoj, ankaŭ de unikaj verkoj t.e. de manskribitaj kaj ekzistantaj nur en unu ekzemplero por la uzo de blinduloj laŭ jenaj demandoj: Titolo? Aŭtoro? Paĝoj? Formato? Jaro? Tradukinto? Eldonejo? Tenejo? Li volonte presus ankaŭ nomaron de naciaj unikaj manskribitaĵoj por blinduloj.

Dankege mi ricevus tiajn sciigojn de bonvoluloj, kaj petas gazetojn esperantajn kaj naciajn represi la alvokon.

F-ino Anna Sharapov ĉe P. Birnkoff Onex, près Genève Suisse.